

l'esperanto

revuo de itala esperanto-federacio

Anno 31 - Numero 4

22 maggio 2000

Questa rivista viene inviata in omaggio a tutti gli europarlamentari italiani, per tenerli costantemente informati sul problema della comunicazione in Europa, sulle attività del movimento per la lingua internazionale esperanto e sulle proposte da questo presentate. A tale scopo è particolarmente dedicata la rubrica "L'Europa e la Lingua".



***Ronda tablo ĉe la Brusela Eŭropa Parlamentejo
de maldekstre: Tišljar, Bormann, Broccatelli, Erasmus, Durwael, Cwik
(foto RÖI)***

L'ESPERANTO

Organo della FEI - Federazione Esperantista Italiana
Organo de IEF - Itala Esperanto-Federacio

Ente Morale con D.P.R. 28-6-56 n. 1720

Direttore responsabile/ Leĝe respondeca direktoro:
Umberto BROCCATELLI

Redattore / *Redaktoro*: Umberto BROCCATELLI
Via G. Brodolini 10, I-00139 Roma - Tel. 06.87.13.50.19
(anche fax, previo avviso telefonico / *riceveblas ankaŭ faksoj, sed necesas telefona antaŭanonco*). Posta elettronica / *e-poŝto*: u.broccatelli@tiscalinet.it / u.broccatelli@libero.it

Corredattore / *Kunredaktoro*: Carlo SARANDREA
Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 Roma - Tel.-fax 06.63.28.39

Amministrazione / *Administrejo*:
Fei - Via Villoresi, 38 - I-20143 Milano - Tel./fax 02.58.10.08.57 - c/c post. / *pĉk* 37312204
Banca (*bankkonto*): Banco Ambrosiano Veneto, Milano 0002, Cod. ABI 03001, CAB 01602, n. conto 36255-62
Conto UEA / *UEA-konto*: *ief*a-p
Posta elettronica: *f.esp.it@infinito.it*
Internet: *http://www.esperanto.it*

Comitato esecutivo della Fei / *Plenuma komitato de Ief*:
Giordano FORMIZZI, presidente / *prezidanto*
Renato CORSETTI, vice-presidente / *vicprezidanto*
Gustavo BONVECCHIATO, segr. gen./ *ĝen. sekretario*
Gianfranco POLERANI, cassiere / *kasisto*
Laura BRAZZABENI, insegnamento / *instruado*
Pierluigi CINQUANTINI, congressi / *kongresoj*
Fabrizio PAGLIAROLI, informazione / *informado*

Pubblicazione riservata agli Associati

Quote associative 2000:	Lire	Euro
Associato ordinario	50.000	25,82
Associato sostenitore	150.000	77,46
Associato garante	500.000	258,20
Associato fino a 25 anni	25.000	12,91
Associato familiare	25.000	12,91

Tutte le quote, tranne quella di Associato familiare, danno diritto a ricevere la rivista.

Agli Associati sostenitori sarà inviato in omaggio un libro; agli Associati garanti è offerta l'iscrizione gratuita al Congresso nazionale.

Le iscrizioni si ricevono presso i Gruppi locali oppure direttamente presso l'amministrazione Fei.

La IEJ (Itala Esperantista Junularo - Gioventù Esperantista Italiana) è la sezione giovanile della Fei. Ne fanno parte gli Associati fino all'età di 30 anni. A cura della IEJ sono redatte le pagine di *Nova Sento* all'interno della rivista.

Registrazione al Tribunale di Milano n. 85 del 27 febbraio 1970

Stampa: Elettrongraf - Via Dina Galli, 5 - 00139 Roma tel. 06.87.13.62.64

In copertina: Tavola rotonda a Bruxelles presso il Parlamento Europeo

Anno 31 - N. 4

22 maggio 2000

DOPO OSTENDA

Questo numero è particolarmente dedicato alle relazioni sul recente 4° Congresso Esperantista dell'Unione Europea, svoltosi a Ostenda.

È stato un congresso importante, in cui alla parte turistica e culturale si è unita una rilevante parte di lavoro, che ha portato a notevoli risultati. *L'Europa Esperanto-Unio* riprende il suo impegno con buona lena e invita tutti a collaborare. Particolarmente importante è la campagna per una "Conferenza permanente sul problema delle lingue nell'Unione Europea" (vedi p. 6, punto 2, e p. 8).

Troverete inoltre recensioni e abbondanti notizie dall'Italia e dal mondo.

Fuori dei soliti schemi è l'articolo del Prof. Contardo Telaretti (p.18-19) "Comunicazione e mediazione comunicativa", che riprende il contenuto di una sua recente conferenza.

Le pagine di *Nova Sento* v'informano sull'assemblea annuale della IEJ e sui nuovi *estraranoj* eletti, ai quali facciamo i più vivi auguri di buon lavoro.

Nel prossimo numero, che conterrà la convocazione dell'assemblea FEI a Casalecchio, cercheremo di mettere il materiale che non ha trovato posto in questo. (Red.)

Volete sostenere l'Europa Esperanto-Unio?

Il Comitato EEU, durante il congresso di Ostenda, ha deciso di aprire una lista di "simpatizzanti dell'EEU", cioè di amici che desiderano essere costantemente informati sull'attività esperantista a livello europeo e sostenere tale attività. La quota minima di adesione è di 20 euro all'anno; per gli italiani 39.000 lire, da inviare alla FEI con l'indicazione *Simpatianto de EEU*.

Riceverete per posta il bollettino *Europa Bulteno* su carta.

È lo stesso bollettino, in veste migliore, che già si può ricevere gratis per rete chiedendolo a *u.broccatelli@tiscalinet.it*.

ATTENZIONE!!! IN VIA ECCEZIONALE QUESTO NUMERO VIENE INVIATO ANCHE AGLI ASSOCIATI CHE NON HANNO ANCORA RINNOVATO LA LORO ISCRIZIONE PER L'ANNO 2000. MA QUESTO È PROPRIO L'ULTIMO. PERCIÒ AFFRETTATEVI!

Nuovi soci sostenitori 2000:

- 17) Giacomo DELLA GUARDIA, Napoli
- 18) Laura VIRGILIO, Napoli
- 19) Nicola MINNAJA, Roma

EN OSTENDO KUNVENIS SPECIMENO DE LA EŬROPA POPOLO

Ĉu ekzistas eŭropa popolo aŭ ekzistas nur unuopaj nacioj en la eŭropa kontinento? Jen demando, kiu povas ricevi malsamajn respondojn laŭ la diversaj vidpunktoj. Laŭ iaj aspektoj la homoj de la diversaj landoj de Eŭropo, kaj precipe tiuj de la Eŭropa Unio, jam estas tre proksimaj inter si: laŭ kulturo, laŭ kutimoj, laŭ vivnivelo. Post jarcentoj de militoj ili ĝuis pacon en la lasta jarcent-duono kaj milito inter ili jam estas eĉ ne pensebla. Dek unu el la EU-landoj havas komunan monunon, kiu post unu kaj duona jaro fariĝos materie videbla en la manoj de la civitanoj.

Sed konscio pri eŭropa identeco ankoraŭ ne estas ĝenerala. Homoj povas samtempe havi plurajn identecojn (kiel tre bone klarigis Zlatko Tišljar): vilaĝa, regiona, nacia kaj ankaŭ eŭropa. Tre gravaj konsistigaj elementoj de tiuj identecoj estas la lingvo kaj la aparteno al politika komunumo. Kaj tiuj ĉi ankoraŭ mankas al eŭropanoj: ili ne havas neŭtrale komunan lingvon, ili ne havas komunan ŝtaton, kvankam E.U. vojas tiudirekte.

Kelkaj eŭropanoj tamen havas almenaŭ unu el tiuj du konsistigaj elementoj, nome neŭtrale komunan lingvon, kaj ĝenerale ili havas ankaŭ fortan konscion pri la neceso de pli forta unuiĝo.

Pli ol tricent el tiuj eŭropanoj kunvenis en Ostendo en la 4a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso. Ili konsistigis specimemon de tiu eŭropa formiĝanta popolo, kiu, gardante siajn regionajn kaj naciajn identecojn, tamen akiris ankaŭ eŭropan identecon, kaj, parolante lingvon, kiu povus fariĝi la neŭtrale komuna lingvo de Eŭropo, donas ekzemplon sekvindan.

Tio ne kontraŭdiras la celon ke Esperanto fariĝu neŭtrale komuna lingvo de la homaro. Eŭropo donis al la resto de la homaro multajn ekzemplojn aŭ instruojn, kiujn poste oni sekvis aliloke; kelkaj estis tre malbonaj (naciismoj, diktaturoj, rasismoj), sed kelkaj estis bonaj kaj sekvindaj (demokratio, toleremo, homaj rajtoj). Same kiel Eŭropo, se ĝi vere atingos pacan politikan unuiĝon, donos grandegan ekzemplon al la ceteraj mondopartoj survoje al estonta tutmonda unuiĝo, tiel ankaŭ, se Eŭropo solvos sian internan lingvoproblemon per neŭtrala lingvo, ĝi proponos al la cetera mondo validan solvon por la tutmonda lingvoproblemo.

Pri la graveco de la eŭropa tereno por la sukceso de la ideo de neŭtrale komuna lingvo la konscio pli kaj pli disvastiĝas en la Esperanto-mondo. Tion pravas ankaŭ la ĉeesto en la inaŭgura kunsido de la kongreso, la vesperon de ĵaŭdo la 27a de aprilo, de du estraranoj de UEA, Michela Lipari, ĝenerala sekretario, kaj Renato Corsetti, vicprezidanto, kaj de Stefan MacGill, estrarano de ILEI. Ili alparolis la kongreson, ne nur portante saluton, sed deklarante sian pretecon kunlabori por ĝiaj celoj.

Tion ni alte aprezas.

Umberto Broccatelli

4a EŬROP-UNIA ESPERANTO KONGRESO EN OOSTENDE

De la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo okazis la kvara Eŭrop-Unia Esperanto-kongreso en Oostende kun proksimume 330 aliĝintoj el 20 landoj. Tiu ĉi kongreso estis eksterordinara el diversaj vidpunktoj.

1. Ĝi havis tri temojn, nome “Ekologio, ŝlosilo por la 3a jarmilo”, “Eŭropa Unio” kaj “Interkulturo”. La ĉeftemo estis ekologio. Komitato Jean-Pain ĉeestis per belega informa budo kaj Frederik Van den Brande prizorgis prelegon. En la enirhalo estis ankaŭ ekspozicio de publikaĵoj pri ekologio el la EU-landoj. Parto de la kongresanoj biciklis al la ekologia centro en Oostende.

Profesoro Orszach prelegis pri «Mastrumado de la akvo, analogio kun internacia komunikado» en la Eŭropa Parlamento.

La dua temo *Interkulturo* manifestiĝis per demonstrado de la projekto al lernejestroj en Oostende kaj denove dum la solena inaŭguro fare de Stefan MacGill en ĉeesto de aro da eminentuloj el la provincaj kaj urbaj instancoj, kiuj promesis subteni ĝin.

Por priparoli la lingvajn problemojn de EU ni vizitis la Eŭropan Parlamenton kaj diskutis

kun la eŭroparlamentanino Nelly Maes. Pro parlamenta ferio aro da parlamentanoj, kiuj unue promesis partopreni, lastminute rezignis. Tie ankaŭ okazis debato pri la prelego, kiun Zlatko Tišljarić faris la antaŭan vesperon pri «Eŭropa identeco».

2. Ankaŭ eksterordinara estis la subteno de influhavaj personoj. La kongreso akiris la altan protekton de la belga reĝo. En la Honora Komitato *Interkulturo* estis 19 personoj, nome la tuta provinca estraro kaj la urbestro. En la Honora Listo de la kongreso estis dek ministroj, i.a. la ĉefministro kaj 16 eŭroparlamentanoj.

3. Menciinda estas la nekutima subteno de publikaj instancoj: la lokaj instancoj kunlaboris en la preparoj de la kongreso per tabuloj kaj ŝildoj, senpage disponigis kongresejon, regalon, biciklojn, eniron de muzeo; kaj la lokaj komercistoj mendis 40-on da reklamoj en la multkoloraj dua bultenoj kaj kongreslibro.

4. Sendube ankaŭ la eho ĉe la publiko en multvizitata populara banurbo estis nekutima: 40 flagoj kun la vorto Esperanto flirtis sur la kongreseja placo meze de la urbo, ĉe la kongresejo, ĉe diversaj butikoj kaj hoteloj, sur la ekskursaj ŝipoj kaj ĉe la enirpordoj, kie okazis la aliaj programoj.

La gazetaro raportis per grandaj artikoloj kun fotoj, la loka televidstacio filmis du fojojn kaj okazis radiointervjuoj.

5. Plaĉa estis ankaŭ la kombino de la temoj kun turismado: la vizito al la Eŭropa Parlamento kombiniĝis kun busa kaj pieda ĉiĉeronado tra la urbo Bruselo kaj gvidataj vizitoj al la urbodomo; post prelego pri ekologia temo la partoprenantoj vizitis ekologian centron kaj *Atlantikwall*-muzeon; dum ŝipekskurso oni aŭdis prelegon pri «Delfenoj kaj balenoj en la norda maro» de Wim De Smet, okazis forumo de la laborgrupo *Perspektivo* kaj la paro Robineau rakontis pri sia ok-jara vojaĝo tra la mondo.

Malforta flanko estis tro malgranda grupo da lokaj kunlaborantoj por gvidi la kongresanojn tra la kompleksa programo. Konklude mi pensas ke la kongreso estos memorinda kaj havis aron da elementoj kiuj povus inspiri la organizontojn de la venonta kongreso.

La 5a EEU-kongreso okazos en 2002 en Verona.

Ivo Durwaal, sekretario de FEL

LA TAGO ĈE LA EŬROPA PARLAMENTO EN BRUSELO

29a de aprilo 2000

Kadre de la 4a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazinta en Ostendo (27a de aprilo - 1a de majo 2000) reliefigis inter ĉiuj aliaj programoj la grava kunveno sub la titolo "Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo".

Dum vasta kaj multaspekta debato oni enfokusigis originalajn flankojn de la lingvo-problemo ne nur rilate la rolon de Esperanto en la Eŭropa Unio, sed ankaŭ koncerne aliajn ĝeneralajn problemojn.

Efektive la eksterordinara evento fariĝis avangarda momento pro ĝia ĝustatempeco ĉe la sojlo de la tria jarmilo kaj la altsignifa temaro kiu malfermis la vojon de necesa taŭga programo pri unueca komuna politiko.

Elstarigis la renkontiĝon prestiĝaj prelegantoj (prof. Joseph Orszagh de la Universitato de Mons, en Belgio, kaj la kroata Zlatko Tišljarić, verkisto kaj direktoro de la slovena *Interkulturo*) kaj spertaj kunordigantoj (Hans Erasmus, la motoro de la Brusela Laborgrupo pri la Lingvoproblemo de la Eŭropa Unio) kaj Michael Cwik, ekonomikisto, funkciulo de la Eŭropa Komisiono, kun la helpo de spertuloj kiel la germano Werner Bormann, la italo Umberto Broccatelli, la hispana s-ino Rafaela Urueña de Hernandez, profesorino pri internacia juro en la Universitato de Valladolid. Tamen ne duaranga estis la multnombra kaj altnivela ĉeestantaro, atenta dum la aŭskultado, vigla kaj instiga dum la debato.

Malfermis la prelegaron eminenta gasto: s-ino Nelly Maes, belga eŭroparlamentanino, kiu sincere defendis la pozitivajn flankojn de la plurlingveco, kies pruvo estas la trilingva realo de Belgio, frukto de respekto al historiaj kaj tradiciaj radikoj, kiun lingvo artefarita ne rajtus damaĝi.

Sed la efika argumentado de pluraj ĉeestantoj unue memorigis al ŝi la multajn malnovajn

antaŭjuĝojn, erarojn kaj falsajn ideologiojn de hegemonio kaj superregado kunligitajn kun la kulto de nacieco; due, obĵetis ke multo en nia ĉiutaga vivo estas artefarita; trie, asertis, ke, se Eŭropo akceptis komunan monon, ne kompreneblas kontraŭstaro aŭ apatio al komuna lingvo.

Konklude, s-ino Maes konsentis ke jes, tio, kio mankas ne estas favoraj argumentoj, sed la politika volo ŝanĝi la nunan lingvosistemon, malgraŭ la kostoj de miliardoj por la interpretistoj, kosto kreskanta ĉiufoje kiam novaj landoj petas eniri la Eŭropan Union. Vere la politikistoj havas malfacilaĵojn bone kompreni unu la alian kaŭze de la ĉiam kreskanta multlingveco. Pro tio ŝi promesis, inter ĝenerala aplaŭdo, ke ŝi mem eklernos Esperanton.

Post tiu esperiga uverturo, alternis ĉe la mikrofono la oficialaj prelegantoj kaj ĉiu el ili alfrontis la kernan problemon de la Eŭropa identeco laŭ sia propra vidpunkto, en la jena sinsekvo.

1) Sen flankenmeti la aspekton de la pli kaj pli kreskantaj kostoj de la plurlingveco, la lingvo Esperanto mem povas fariĝi signo de eŭropa identeco, identigante kiel fincela ŝtupo de lingva projekto, kiu rekonas ĉe la unua ŝtupo la regionan lingvon (aŭ dialekton), ĉe la dua la nacian, ĉe la tria, la komunan eŭropan lingvon.

2) Identeco ne estas racia elemento, sed sento, emocio, volo, kiu evoluigas la konscion de aparteneco kaj helpas al la redukado al novaj valoroj. Por unuigi Eŭropon do necesas ŝanĝo de valoroj, sekve ŝanĝo de sentoj: fari Eŭropon signifas ami Eŭropon. (*Tišljär*)

3) Pli ol de komuna monunuco, la ebleco de eŭropa unueco dependas de rekta interparolado je ĉiuj niveloj, sekve de komuna lingvo. Esperanto estas sintezo de ĉiuj eŭropaj lingvoj, sed renkontas, en malsama tereno, la samajn politikajn obstaklojn kiel la mastrumado de la akvoj (la specifa fako de la preleganto). Ambaŭ problemoj, multlingveco kaj poluado, postulas saman laboron kaj saman politikan volon kontraŭ la tro multekosta kaj senutila nuna sistemo. La ĝusta solvo povas esti nur klara reorientigo de la eŭropa politiko al novaj teknikoj pli malmultekostaj ol la nunaj. Esperanto solvas la plejmulton de la lingvaj problemoj, sed ĝin kontraŭas lingva apatio kaj apartaj interesoj. (*Orszagh*)

4) Grava faktoro de eŭropa identeco estas ja lingvo, sed eĉ pli grava faktoro estus la ekzisto de komuna ŝtato. Ĝis nun la procezo de unuiĝo marŝis precipe sur ekonomia tereno kaj oni atingis komunan monunucon. Sed nun oni devas fari decidigan paŝon kaj konstrui politikan unuecon. Vera eŭropa politiko postulas registaron, balotojn, konstitucion, surbaze de la principo de subsidiareco, alivorte Federacian Ŝtaton kaj komunan civitanecon.

Same kiel lombardoj, piemontanoj, romanoj, napolanoj, sicilianoj ktp fariĝis italoj post la ekesto de la itala ŝtato, akirante iom post iom sian italan identecon, kune kun la komuna lingvo nacia, tamen ne forlasante siajn regionajn identecojn, same italoj, francoj, germanoj, hispanoj ktp fariĝos eŭropanoj, gardante siajn naciajn identecojn kulturajn kaj lingvajn. Tial eŭropa ŝtato bezonos doni al si neŭtralan eŭropan lingvon, ĝuste por plifortigi la komunan identecon de siaj civitanoj. (*Broccatelli*)

5) Ankoraŭ ne ekzistas eŭropa identeco, ĉar ne ekzistas eŭropaj gazetoj nek eŭropa publiko: komuna lingvo estas kondiĉo por krei aŭtentikan unuecon. (*Bormann*)

Kunligis la intervenojn la sperta kunordiga agado de Hans Erasmus kaj de Michael Cwik, ĉiu en sia propra stilo, per prezentadoj, klarigoj, komentoj, kaj eĉ tradukoj, la unua; per instigoj al konkludaj sintezoj la dua. Tiamaniere danke al perfekte harmonia kunorganizado ĉiu individua kontribuo kunfluus al difino de tio, kion Esperanto signifis, signifas kaj signifos por nia propra kaj ĉies identeco.

Esperanto povas kaj rajtas esti lingvo kaj simbolo de identeco de la naskiĝanta unueca Eŭropo, sed mankis ĝis nun la politika volo.

Trispecaj estas la formoj por enirigi oficiale Esperanton en la novan Eŭropon:

- 1) kiel aldonan lingvon;
- 2) kiel reprezentanton de ĉiuj laborlingvoj;
- 3) en la gamo de la eŭropaj lingvoj.

Ĉi tiu estas la sinteza mesaĝo, kiun de la Eŭrop-Unia Kongreso en Bruselo, avangarda taĉmento de tuteŭropaj civitanoj, ne nur esperantistoj, lanĉis al ĉiuj homoj de bona volo: ĉu unue al U.E.A. kaj al aliaj centroj de esperanta kulturo?

Paola Gozzi Gorini

LA LABORO DE LA EEU-KOMITATO EN OSTENDO

En la kunvenoj de la EEU-komitato estis valide reprezentataj 9 landaj asocioj, kiuj estis pagintaj siajn kotizojn por la jaro 1999, nome: Aŭstrio, Belgio, Francio, Germanio, Hispanio, Irlando, Italio, Nederlando kaj Svedio. Entute 11 landaj asocioj el 15 pagis la EEU-kotizojn por 1999; ne pagis: Britio, Danio, Luksemburgio kaj Grekio. Sed Grekio promesis baldaŭ pagi.

En kvar fermitaj laborkunsidoj la Komitato atingis la jenajn konkludojn:

1) Estas konfirmita la konsisto de la nuna "Trojko" (aŭ Triopo), nome la estraro de EEU:

- Umberto BROCCATELLI, prezidanto
- Katinjo FETES-TOSEGI, sekretario
- Hans TEN HAGEN, kasisto.

2) La propono pri agado por "Konstanta konferenco pri la lingvoproblemo en Eŭropo" estas lanĉita.

La teksto de la Deklaro por aliĝo al tiu kampanjo (kiu estis aprobita ankaŭ kiel kongresa rezolucio) estos tradukita en ĉiujn lingvojn de la Unio (ĝi jam ekzistas en la itala, la franca kaj la nederlanda), zorge de la koncernaj EEU-komitatoj. La landaj asocioj estos invitataj publikigi tiun tekston kaj lanĉi kampanjon por akiro de subskriboj de eŭropaj kaj de naciaj parlamentanoj, de aliaj gravaj reprezentantoj de la politika kaj de la kultura mondo kaj ankaŭ de asocioj, lokaj asembleoj ktp. Fine de la jaro la kolektitaj subskriboj estos aneksaĵo al peticio prezentota al la Eŭropa Parlamento.

Estas bone notite, ke ĉiuj subskribitaj deklaroj estas kolektotaj kaj sendotaj de EEU al la Eŭroparlamentara Prezidentino, je la fino de decembro. Sed nepre necesas, ke la deklarojn subskribitajn de la eŭropaj parlamentanoj la EEU-delegitoj sendu antaŭ septembro, t.e. antaŭ la komenco de oficialaj debatoj pri la kampanjo "2001: jaro de la lingvoj".

3) La propono aliĝi al "Komitato 2020" ne estis akceptita.

4) Oni diskutis la proponon klopodi aranĝi EEU-oficejon en Bruselo. Fine oni alvenis al la decido starigi tie almenaŭ kontakt-adreson. Konkretajn eblecojn kaj manierojn de utiligo oni plu esploras.

5) La projekto "Konstanta Konferenco" startos kiel iniciato de EEU, sed ni turnos nin ankaŭ al aliaj asocioj - ankaŭ neesperantistaj - petante ilian aliĝon. Post kelkaj aliĝoj estos oportune starigi komitaton por antaŭenigi la projekton, en kiu partoprenos la asocioj kiuj volos kunlabori, kaj

per agado kaj per mono. Al tio kunligiĝas la ideo pri oficejo - aŭ kontakt-adreso - en Bruselo, kiu povus havi ĝuste la rolon de centra punkto de kunordigo.

6) Estis ankaŭ aprobita propono farita de la franca EEU-komitato, s-ro Claude Longue-Épée, por ke li persone kontaktiĝu kun G. Caudron, kiu estas ja la sola Eŭropa Parlamentano, kiu ĝis nun oficiale intervenis favore al Esperanto kadre de parlamentaj debatoj. CLE intencas pridiskuti kun G. Caudron la du jenajn temojn:

- Kiel agadi efike (kunlabore) kaj kampanji kadre de la "Jaro 2001: jaro de la lingvoj en Eŭropo".

- Kiu estas la plej efika rimedo, por sendi kaj agnoski fare de la parlamento, niajn subskribitajn deklarojn por "Konstanta Konferenco".

7) Estas notindaj kelkaj rimarkoj faritaj de H. Erasmus, inspiritaj de la nunaj klopodoj de la Brusela laborgrupo.

Pri la ĝenerala sinteno, kiun devus havi EEU (kaj landaj asocioj) estas substrekinde emfazi pri tri karakterizoj de la Eŭropaj Parlamentanoj kaj de la Eŭroparlamentaj komisionoj; tio estas:

- La vorto Esperanto restas tabua plej ĝenerale. Estas ja tabuoj "Komuneco" (!) kaj "artefariteco".

- Estas emfazendaj, nekontesteblaj kaj akceptitaj de ĉiuj (ĉu sincere, ĉu hipokrite?) la vortoj "Diverseco", "Plurlingvismo" (!), do "Propedeŭtikeco".

- La Brusela laborgrupo, sin apogante sur la ĉi-supraj hipotezoj, sukcesis decidigi starigon de speciala komisiono, en kiu oni oficiale parolas pri Esperanto (kaj ne malfavore). Ni atentu, ne damaĝi per tro granda entuziasmo aŭ tro tuja postulemo tiun nekontesteblan progreson.

8) La sekretario de la EEU-komitato, s-rino Katinjo Fetes Tosegi, proponas sin por aranĝo de TTT-ejo de EEU. La propono estas akceptita kun danko.

9) Por la estonta Eŭrop-Unia Kongreso venis propono de s-ro Salvatore Argentino organizi ĝin en Verona (Norda Italio) en la jaro 2002. La propono estas akceptita kun danko.

10) Oni starigas kategorion de individuaj "simpatiantoj de EEU", t.e. homoj kiuj deziras esti regule informataj pri la agado de EEU, helpi finance kaj eventuale kunlabori. Estos "simpatiantoj" tiuj personoj, kiuj pagos al EEU minimuman jaran kotizon de 20 eŭroj; el tiu kotizo duono estos konsiderata kiel kosto por poŝta sendado de papera "Eŭropa Bulteno" (laŭeble 10 numeroj jare) kaj la resto kiel kontribuo al la kaso

de EEU. Komprenble ĉiu pli granda libervola donaco estos bonvena. Aparte malavaraj donacoj estos diskonigataj (krom se la interesato tion ne volos). La pagoj iru al la UEA-konto de EEU: eece-p

11) Broccatelli informis pri la manifestacio por eŭropa demokratio okazonta en Nico (Suda Francio) la 7an de decembro dum la konferenco de ŝtatestroj kaj registarestroj de la Unio. Oni decidis ke EEU ne oficiale aliĝu kun sia nomo, sed invitu la esperantistojn partopreni kun siaj flagoj kaj sloganoj kun postulo pri "lingva demokratio en la Unio". La franca komitatano esploras la eblecojn ricevi organizan apogon de la Nica E-Grupo. Broccatelli sciigos la adresojn en la diversaj landoj, kien oni povos turni sin por havi informojn pri karavanoj aranĝitaj de diversaj asocioj (eŭropismaj, sindikataj, partiaj ktp), al kiuj esperantistoj povus individue aliĝi por ricevi vojaĝ- kaj loĝ-faciligojn.

12) Pri la celoj de EEU, la propono, ke EEU okupiĝu ankaŭ pri plifortigo de la movado en la eŭropaj landoj kie ĝi estas pli malforta, estas malakceptita, tial ke tio estas tasko de UEA kaj de la landaj asocioj; EEU ne havas proprajn monrimedojn kaj devus ricevi ilin de la landaj asocioj por tia agado; cetero eŭropaj esperantistoj individue jam multe kontribuas per asociaj, individuaj kaj kongresaj kotizoj al la enspezoj de UEA, kiu do devus dediĉi parton de sia buĝeto ankaŭ al Eŭropo.

13) Post la kongreso Corsetti sciigis ke UEA pretas konkrete helpi al la agado de EEU kaj ke okazos kunveno de la interesatoj por preparoli la farendaĵojn.

Umberto Broccatelli

FERMO DE LA KONGRESO

En la ferma kunsido, la matenon de la 1a de majo, la kongresanoj aŭskultis raportojn de la organizantoj de la kongreso kaj de la prezidanto de EEU.

Ricevis varmajn dank-esprimojn ĉiuj kunlaborantoj kaj precipe Flory Witdoeckt, kiu estis la motoro de la kongreso.

La kongresanoj aprobis per aplaŭdo la rezolucion jam aprobitan de la EEU-komitato, kiu reprenas la tekston de la deklaro favore al Konstanta Konferenco de Eŭropa Unio pri la Eŭropa Lingvo-Problemo, kiu estos proponata por subskribo al ĉiulandaj eŭropaj eminentuloj.

La teksto de la rezolucio troviĝas ĉi-apude.

(Red.)

REZOLUCIO

Por Konstanta Konferenco de Eŭropa Unio pri la Eŭropa Lingvo-Problemo

I
La partoprenantoj en la 4a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso, kunvenintaj en Ostendo (Belgio) de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo 2000,

konsiderante ke multoblighas denuncoj fare de lingvistoj kaj de eminentaj kleruloj pri la riskoj de progresiva marĝeniĝo de niaj lingvoj favore al la angla lingvo;

konsiderante ke lingvo estas ne nur komunikilo, sed nepre necesa esprimo de iu kulturo, kiu sen ĝi ne povas pluvivi;

prikalkulante do ke la dirita risko koncernas la eŭropan identecon mem, kies esenco kuŝas ĝuste en la plureco de la kulturoj de la Malnova Kontinento;

II
rimarkante krome ke la lingva reĝimo nuntempe reganta en E.U. - de laŭnoma egalrajteco de ĉiuj lingvoj - fariĝas des pli malfacila kaj multekosta ju pli kreskadus la nombro de la lingvoj de la Unio, kaj tial tiu egalrajteco iĝas pli kaj pli nur ŝajna;

prikalkulante fine ke, se la unuiĝo de Eŭropo antaŭeniros, kiel estas dezirinde, kaj pli kaj pli alprenos politikan dimension kaj supernacian strukturon, ĝi devus solvi en malpli neadekvata kaj neefika maniero, ol hodiaŭ okazas, la problemon de la intereŭropa komunikado;

III
konsiderinte ĉion ĉi,

sugestas ke, pro iniciato de la aŭtoritatoj de E.U., kaj aparte de la Eŭropa Parlamento - la Unia institucio, kiu plej multe suferas la menciitajn lingvajn malfacilaĵojn - oni starigu Konstantan Konferencon pri la lingvoj, kiu prefere kunsidu ĉiujare en la sama urbo kaj je la sama dato, en kiu reprezentantoj de E.U. kaj de ĝiaj institucioj, naciaj politikistoj, lingvistoj, aparte kvalifikitaj kleruloj kaj fakuloj kaj reprezentantoj de la eŭropistaj organizaĵoj diskutu la lingvajn problemojn de Eŭropo kaj aparte tiun de la intereŭropa komunikado kaj proponu adekvatajn kaj ne iluziajn solvojn.

Ostendo, la 1an de majo 2000

RISOLUZIONE
PER UNA CONFERENZA PERMANENTE DELL'UNIONE EUROPEA
SUL PROBLEMA LINGUISTICO EUROPEO

I

I partecipanti al 4° Congresso Esperantista dell'Unione Europea, riuniti a Ostenda (Belgio) dal 27 aprile al 1° maggio 2000

considerando che si moltiplicano le denunce di linguisti e uomini di cultura circa i rischi di progressiva emarginazione delle nostre lingue a beneficio dell'inglese;

tenuto conto che la lingua non è solo strumento di comunicazione, ma mezzo indispensabile di espressione di una cultura, che non può sopravvivere senza di quella;

constatando pertanto che il rischio che dicevamo concerne la stessa identità europea, la cui essenza sta appunto nella pluralità delle culture del Vecchio continente;

II

rilevando altresì che il regime linguistico attualmente vigente nell'U.E. – di parità nominale fra tutte le lingue – diventa sempre più difficile e costoso via via che le lingue dell'Unione aumentano, per cui quella parità è sempre più solo apparente;

tenuto conto infine che se l'unione dell'Europa avanzerà, com'è auspicabile, e assumerà sempre più dimensione politica e struttura sovranazionale, essa dovrà risolvere in modo meno inadeguato e inefficiente che non oggi il problema della comunicazione intereuropea;

III

considerato tutto questo,

fanno voti perché, per iniziativa delle autorità dell'U.E., e in particolare del Parlamento Europeo – l'istituzione comunitaria che più soffre delle ricordate difficoltà linguistiche – venga istituita una *Conferenza permanente delle lingue*, destinata preferibilmente a riunirsi ogni anno nella stessa città e alla stessa data, in cui rappresentanti dell'U.E. e delle sue istituzioni, politici nazionali, linguisti, uomini di cultura particolarmente qualificati ed esponenti delle organizzazioni europeiste discutano i problemi linguistici dell'Europa, e in particolare quello della comunicazione intereuropea, e ne studino e propongano appropriate e non illusorie soluzioni.

Ostenda, 1° maggio 2000

UN APPELLO DA OSTENDA

Il Comitato dell'Unione Esperantista Europea (EEU) lancia in tutta l'Unione una campagna per la raccolta di adesioni alla dichiarazione (pubblicata in questa rivista nel n. 2/2000 a p. 8) il cui contenuto è rispecchiato nella risoluzione approvata a Ostenda, qui sopra riportata.

Invitiamo i nostri associati a darsi da fare per raccogliere firme di parlamentari, nazionali ed europei, di uomini di cultura (accademici, scrittori, noti giornalisti ecc.), di associazioni, di assemblee elettive.

Fate fotocopie del testo pubblicato nel n. 2/2000 oppure della risoluzione sopra riportata (nella quale vanno cambiate solamente le prime due righe: *I partecipanti ecc.*, con *Noi sottoscritti*). Inviatene le dichiarazioni raccolte a: *U. Broccatelli, Via G. Brodolini 10, 00139 Roma*.

SULL'IDENTITÀ EUROPEA

Il tema dell'identità europea è stato sollevato dallo scrittore croato-sloveno Zlatko Tišljär, in due relazioni, una nell'inaugurazione a Ostenda e una durante l'incontro presso il Parlamento Europeo a Bruxelles ed è stato al centro di un vivace dibattito.

Dobbiamo abbandonare, dice Tišljär, l'idea che un individuo abbia un'unica identità, quella nazionale: “una nazione, uno Stato, una lingua” ed eventualmente “una religione”. Un individuo può avere diverse identità contemporaneamente: l'appartenenza a un villaggio o una città, a una regione, a una nazione, a uno Stato, e poi anche a una religione, a una professione ecc. L'appartenenza a un gruppo è generalmente marcata da un certo modo di parlare: un dialetto, una lingua, un gergo. Una lingua serve non solo a far sì che gli appartenenti a un gruppo si capiscano fra loro, ma anche a marcare una distinzione con gli altri gruppi, a rafforzare l'identità. La lingua naturale è il dialetto, la lingua locale o la variante regionale della lingua nazionale. Già la lingua nazionale standard è artificiale, appresa a scuola, e viene accettata da tutti perché è neutrale rispetto ai vari dialetti. Così l'Europa, per affermare la propria identità, ha bisogno di una lingua comune, che sia neutrale rispetto alle lingue nazionali. (*U.Br.*)

Villaggio San Paolo, Cavallino (Venezia)

VERBALE DELL'ASSEMBLEA ANNUALE DELLA GIOVENTÙ ESPERANTISTA ITALIANA

Il giorno 23 aprile 2000, alle ore 14.00, in occasione del 24° Festival Internazionale Giovanile, si riunisce l'Assemblea Annuale della Gioventù Esperantista Italiana. Presidente dell'Assemblea è Francesco Amerio. L'ordine del giorno è il seguente:

1. Relazione morale
2. Relazione finanziaria
3. Elezione del Presidente
4. Elezione del Direttivo
5. Varie ed eventuali

Dopo aver scelto Bethuel Chiesa come Segretaria dell'Assemblea, vengono nominate due scrutatrici: Ivana Giordano ed Elisa Donato.

1. Relazione morale

A presentare la relazione morale è il Presidente uscente Flavia Dal Zilio. La principale attività svolta nel corso dell'anno 1999-2000 è stato il Festival, che quest'anno è stata organizzato insieme all'Organizzazione Mondiale dei Giovani Esperantisti (TEJO). Si sono intensificati i rapporti con la Federazione Esperantista Italiana, con la partecipazione di membri delle due associazioni ai rispettivi incontri. Internet ha dato la possibilità di poter divulgare meglio l'Esperanto, grazie anche a corsi in rete realizzati da Federico Gobbo, e risulta uno dei mezzi comunicativi su cui puntare molto in futuro. Viene fatto notare che vanno recuperati i rapporti con il Ministero degli Affari Esteri. Al termine viene effettuata la votazione sulla relazione morale con il seguente risultato:

Votanti	25
Favorevoli	25
Contrari	0
Bianche	0
Nulle	0

La relazione morale viene approvata all'unanimità.

2. Relazione finanziaria

Manuel Giorgini, in qualità di cassiere uscente, presenta il quadro finanziario dell'associazione. Risulta un leggero passivo, ma si attendono ancora

i fondi promessi dalla TEJO. Viene votata la relazione finanziaria con il seguente esito:

Votanti	25
Favorevoli	21
Contrari	0
Bianche	0
Nulle	4

3. Elezione del Presidente

L'attuale Presidente Flavia dal Zilio non si ricandida e propone come successore Manuel Giorgini. Viene chiesto ai soci se c'è tra i presenti un altro candidato, ma, dato che nessuno si propone, si passa alla votazione:

Votanti	29
Manuel Giorgini	24
Nulle	5

Manuel Giorgini viene quindi eletto nuovo Presidente della Gioventù Esperantista Italiana.

4. Elezione del Consiglio Direttivo

Il Consiglio uscente propone le seguenti persone come candidate: Chiara Baro, Daniele Binaghi, Michele Bondesan, Bethuel Chiesa, Flavia Dal Zilio, Michele Gazzola, Giovanni Quer e Sonia Tavarone. Si candida anche Luca Bertero. I soci votano e i risultati sono i seguenti:

Chiara Baro	12
Luca Bertero	5
Daniele Binaghi	18
Michele Bondesan	11
Bethuel Chiesa	18
Flavia Dal Zilio	22
Michele Gazzola	12
Giovanni Quer	12
Sonia Tavarone	20

Poiché il Consiglio Direttivo deve essere formato da non più di 8 persone oltre al Presidente, Luca Bertero non risulta eletto.

5. Varie ed eventuali

Non ci sono altri argomenti da discutere, perciò alle ore 16.10 l'Assemblea viene sciolta.

La Internacia Junulara Festivalo ebligis plifortigon de la jam starigitaj kontaktoj inter Itala Esperantista Junularo kaj AEGEE - Association des États Généraux des Étudiants de l'Europe (Forumo de la Eŭropaj Studentoj): anoj el la Venecia grupo de tiu ĉi lasta asocio partoprenis la Festivalon por prezenti sin al la partoprenantoj. AEGEE impresoj similas al niaj organizoj, tio tre evidentas el la sinteno de ĝiaj anoj kaj ilia maniero rakonti siajn spertojn pri ĝi. Ni planas laŭeble kunlabori kun ĝi, per reciprokaj invitoj, trejnado, klerigo... kaj kompreneble reklamado, do jen! Nepre kontaktu tiun asocion kaj informiĝu, ĉu ĝi aktivas ankaŭ en via urbo!

ĈU VI VOLAS KONI EŬROPON JE BAGATELAJ PREZOJ? ALIĜU AL AEGEE!

Ferioj, stud-restadoj, kursoj, kongresoj kaj eventoj neforgeseblaj, entuziasmigaj kaj malmultekostaj!

AEGEE estas neŭtrala neprofitcela asocio kiu helpas la eŭropan integriĝon je junulara nivelo, subtenante la studentan moviĝpovon per siaj 260 sidejoj en la plej gravaj universitataj urboj kaj aranĝante interalie:

- S U M M E R UNIVERSITIES:

t.e. amuzaj someraj dusemajnaj lingvo- kaj kultur-kursoj, kiuj kostas ITL 250 000 inkluzive loĝadon kaj manĝadon.

- EVENTOJN:

t.e. malpli longaj renkontiĝoj (3 - 5 tagoj) kun malaltegaj kotizoj.

AEGEE estas agnoskita de la Konsilio de Eŭropo kaj patronata de la Eŭropa Parlamento, de OSCE kaj de UNESKO.

KONTAKTU NIN

041 942247

041 5209210

aegee@unive.it

<http://aegee.interfree.it>

<http://www.aegee.org>

La listo de la estraranoj de Itala Esperantista Junularo por la jaro 2000/2001

GIORGINI'S LIST

Via redaktanto konas ĉiujn naŭ, kaj povas certigi vin ke ĉiuj estas valoregaj homoj por nia asocio. Se ili sukcesos harmonie kunlabori, la rezultoj ne povos esti malpli ol brilaj. Kompreneble Nova Sento daŭrigos informi vin pri ili, ekzemple montrante al vi iliajn vizaĝojn, intervjuante ilin kaj informante vin pri kiel ili dividos inter si siajn pezajn taskojn. Sed intertempe, se vi havas ideojn, proponojn, kuraĝigojn, ion ajn por diri, ne hezitu kontakti ilin! Ne gravas kiom vi aĝas, kie vi loĝas, kiom vi spertas: komuniki nepras!

Manuel GIORGINI (prezidanto)

S. Polo, 606
IT-30125 Venezia
+39 041 5203245
+39 335 7035666 (portebla)
phalanx@kyuzz.org

Chiara BARO

Via Virgilio, 5
IT-31025 Santa Lucia di Piave (TV)
+39 051 6446412
+39 347 700519 (portebla)
c_baro@yahoo.com

Daniele BINAGHI

Via Terminon, 57
IT-36020 Villa Ganzerla (VI)
+39 0444 730315
daniele@esperanto.it

Michele BONDESAN

Via Baroni, 26
IT-45100 Rovigo
+39 0425 23566
mikebond@tin.it

Bethuel CHIESA

Via Guicciardini, 31
IT-28100 Novara, aŭ
c/o Cuvertino via Gotti 15
IT-10149 Torino
+39 0321 432136
+39 011 730210
+39 347 8269827 (portebla)
bethulla@hotmail.com

Flavia DAL ZILIO

Piazza Monumento, 6
IT-35028 Piove di Sacco (PD)
+39 049 5840050
flavia.dalzilio@esperanto.it

Michele GAZZOLA

Via Giuliani, 7/3
IT-33100 Udine, aŭ
Via Sannio, 18
IT-20137 Milano
+39 0432 480363
+39 02 5516576
s780478@students.uni-bocconi.it


Giovanni Matteo QUER

Viale Italia, 18
IT-31033 Castelfranco Veneto (TV)
+39 0423 491564
annalio@tin.it

Sonia TAVARONE

Via Audenino, 10
IT-10020 Cambiano (TO)
+39 011 9440881
+39 347 9672572 (portebla)
sonia_cambiano@yahoo.it


Esiste un concorso, il Concorso Marelli, che permette ai giovani italiani di partecipare a un grande incontro esperantista anche lontano (Australia, Cina, Israele, Corea, Brasile...) senza pagare né iscrizione, né vitto e alloggio, né viaggio! Per darvi un'idea, ecco qualche immagine fornita da uno dei vincitori di tre anni fa. Per concorrere basta prendere il diploma di terzo grado di esperanto: un'impresa che chiunque può compiere senza troppi sforzi! Consigliamo a tutti di informarsi sulla possibilità di partecipare a qualche esame di esperanto (ogni anno se ne tengono in parecchie città italiane). All'occorrenza rivolgetevi pure a Nova Sento!



I vincitori di quest'anno del Premio Marelli, ritratti insieme al cantante dei [!piks]. Foto A. Delindati


MEMORIE DAI MARI AUSTRALI

di Fabrizio Pagliaroli



Luglio '97

All'Isola dei Canguri, al largo di Adelaide, un cangurino si accinge a fare una telefonata.




Luglio '97

Grazie al Premio Marelli posso andare in Australia, al Congresso di Adelaide. Qui sono nei dintorni di Melbourne e mi faccio una chiacchierata con degli amici canguri.



Agosto '97

Dopo il Congresso e un tour dell'Australia, visito per una settimana la Nuova Caledonia, territorio francese d'Oltremare a est dell'Australia. Qui sono nel Nord della Nuova Caledonia, accanto a una capanna Kanak tradizionale. I Kanak sono gli autoctoni del territorio.



Agosto '97

Su una spiaggia deserta nel nord della nuova Caledonia, al crepuscolo dopo il tramonto.

KIEN

Appuntamenti Giovani

05-09.07, Tolosa (Francia)
**Festival della Cultura
e dell'Arte (KAFE)**



In una delle più belle città del mondo, un festival con la crema della musica e dell'intrattenimento in esperanto: JoMo & la Liberecanoj, Persone, Solotronik, Jomart & Nataša, Ĵak le Pŭil, Kajto, F-ino Emily Barlaston... Un incontro davvero indimenticabile!
EUROKKA, FR-31450
Donneville
Tel./Fax 0033 561 819595
eurokka@esperanto.org

17-23.07, Helsinki (Finlandia)
**7° Festival della Cultura
Esperanto (KEF)**

Kultura Esperanto-Festivalo
2000, Siltasaarenkatu 15 C 65,
FI-00530 Helsinki
kef2000@esperanto.fi

1-15.07, Blera (Viterbo)
**Campo di lavoro
archeologico
straordinario "Alla
ricerca della città
perduta"**

16-23.08, Blera (Viterbo)
**6° Campo di lavoro
archeologico
internazionale**

Quest'anno il famoso campo di lavoro di Blera addirittura raddoppia! In agosto nella

"solita" necropoli etrusca, in luglio nella città medievale che solo ora sta tornando alla luce. Chiedete a chi c'è stato: ne vale la pena!

Pier Luigi Cinqantini
via Dante Alighieri, 2
01010 Blera (VT)
Tel./Fax 0761 479503
Cell. 0335 492337
pcinqua@tin.it
<http://web.tiscalinet.it/cinqantini/ial.htm>
<http://web.tiscalinet.it/prolocoblera>

27.07-02.08, Nyiregyháza (Ungheria)

**Settimana
Internazionale
Giovanile (IJS)**

Ungheria + Esperanto, un binomio sicuro per una settimana che sempre più numerosi giovani da tutta Europa non vogliono lasciarsi sfuggire
Hungara E-Junularo, pk. 87, HU-1675 Budapest
Tel. 0036 1 2828885
hej@math.bme.hu

03-10.08, Gleb of Orchy (Scozia)

**Settimana
Scozzese**

Rolf Fantom, 92 Enborne Road, Newbury Berkshire, RG14 6AN, Britio
JEB@esperanto.org

05-12.08, Hongkong (Cina)

**56° Congresso
Internazionale
Giovanile (IJK)**

Il più importante appuntamento giovanile del 2000, nella palpitante metropoli che è già nel futuro

LKK de IJK, P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing
epc@china-report.com

08.09, Varna (Bulgaria)

**Seminario
dell'Organizzazione
Mondiale dei Giovani
Esperantisti**

"Collaborazione fra i giovani per una cultura di pace nei Balcani" - un seminario che non dimenticherete: formativo, entusiasmante e quasi gratuito
Sabira Ståhlberg kaj Aleksandar Shivarov, p.k. 405, BG-9000 Varna
Tel. 00359 52 246941
Fax 00359 52 246326
kontakto@esperanto.org

**PER ALTRE
INFORMAZIONI
CONTATTACI!**

Nova Sento a cura della
Gioventù Esperantista Italiana



Redazione:
Giuseppe Castelli
via Grandi 16
29100 Piacenza

Telefono: 0523 592908

Posta elettronica:
gcastelli@enjoy.it

Conto bancario intestato a
Gioventù Esperantista Italiana,
ABI 3002, CAB 2002, c/c
650791/19, SWIFT: BROMIT2V,
Banca di Roma, Filiale di
Venezia, Agenzia n. 8

Conto corrente postale
n. 11110251 intestato a
Gioventù Esperantista Italiana
presso Manuel Giorgini, S. Polo
606, 30125 Venezia

Nova Sento è su internet
all'indirizzo
<http://www.esperanto.it/iej/nova-sento/>

LA NOSTRA BIBLIOTECA



Recensioni RECENZOJ

Dan Tirinaro (1910-1944), *La Liberpoeto*, poemaro, eldonis: Korea Esperanto-Asocio, 200 paĝoj (kun fotoj). Prezo nekonata.

Dan Tirinaro (koree Ĝong Seasop) estis esperantlingva korea poeto, kiu mortis nur 34-jara en 1944. Pri li mankis ĝis nun, almenaŭ miascie, ajna informo spite la fakton, ke li publikigis en 1938, en Parizo, sian unuan kaj nuran poemaron kun la titolo *La Liberpoeto*. Mankas pri li informoj kaj poem-specimenoj ankaŭ en la eldonoj de *Esperanta Antologio*. Per grafike inda reeldono, la Korea Esperanto-Asocio klopodas rememorigi al la esperantistoj tiun sian nuran kaj apartan poeton.

Li naskiĝis en korea urbeto en 1910, kvara el ses gefiloj, unue studadis en koreaj lernejoj kaj eniris, deksesjaraĝa, en japanan kolegion en Hiroŝimo por studi literaturon. Dum la kolegiaj jaroj li ankaŭ lernis Esperanton kaj, kiam dudekjara, en 1930, li ekstudis juran fakon en la Imperia Universitato de Kioto kaj poste francan literaturon en la Imperia Universitato de Tokio. En 1936 li veturis tra Ĉinio al Francio por studi francan literaturon ĉe la Pariza Universitato, kaj en Parizo publikigis sian esperantan poemaron. Li revenis al Koreio en 1939, estis ankaŭ dum kelka tempo enkarcerigita, edziĝis en 1940 al fraŭlino Ĝo Maljon, diplomitino pri angla literaturo, kaj, post nur kvarjara geedza vivo kaj naskiĝo de filino Ĉoroe, li mortis pro meningito en 1944, nur 34jara.

Tion ni ekscias pri li el antaŭparolo al la poemaro, sed kian personecon portretas, kian mesaĝon postlasas liaj 105 enlibrigitaj poemoj?

La librotitolo jam supozigas poeton certe engaĝitan en lukto por libero, kiu, eklege, tuj evidentiĝas kiel ĉia libero kaj ĉies libero, kiun li prikantas kiel mondĉivitano batalanta kontraŭ etmensa burĝaro, opresemaj naciismoj, profitavidaj privilegiuloj, kontraŭ liberomanko ĉe ĉiuj estajoj, ekde la homaj ĝis la bestaj.

Per dekkvinĉapitra poemaro ni itineras kun Dan Tirinaro tra “tiu sopiro al libero”, kiu iĝas preskaŭa martelanta inkub-refreno plurpoeme kaj tra pluraj paĝoj.

Kiel la suno inundas per lumo la mondon, tiel la liberpoeto per veroservo surkovru la mondon por vipi la opresantojn kaj stimuli al ago kaj ribelo la opresatojn. Por li la vortoforto estas la esenco poezia, kaj ĉi lasta estas la esenco de la koro, kiu en poeto brulu per tri oleoj: ili estas “Libero”, “Fiero” kaj “Racio”.

Poeto ne verkas por mono aŭ por flato al burĝo aŭ al regopovo, sed ja por produkti valorojn por la homa socio, ĉar poezio “jen estas la arto de vero”.

Per sia juna verovo kaj liberama pasio li iĝis mondvojaĝanto kaj kosmopolito, jam en la tridekaj jaroj, kiam vojaĝoj tramonde ne tiom facilis kiel nuntempe. Li pensadis kaj verkis kiel mondĉivitano taksante la naciojn senlimaj, la nacianojn kunfrataj al alilandanoj, laŭ aŭtenta homarana spirito. Li estis konvinkita idealisto kun juna naivo de kuraĝulo preta fordoni eĉ sian vivon en porlibera batalo kontraŭ mensogo kaj hipokritoj:

*Demetinte la maskon de mondo mensoga,
Se mi povus promeni tutnude la mondon!
Demetinte mensogon de homo trompema,
Se mi povus saluti tutnude maskulojn!*

(paĝ.160)

Se lia amo al libero kaj lia engaĝiĝo por liberbataloj ajnaspecaj plektiĝas ĉiuverse, certe ne ĉiu lia verso gardas poezilingvon artan kaj altstilan. Neniadube lia poemaro atentindas laŭ literaturhistoria, enhava, socipentra kaj sentesprima vidpunktoj, sed ĝi tute ne kontentigas la postulojn de la moderna kaj nuntempa Poezilingvo esperanta. Krome svarmas eraroj plurspecaj, ekde elizio de pluraj aŭ akuzativaj substantivoj, elizio de prepozicio de kiel en la itala, eraraj vortkunmetoj, misuzo de transitivaj kaj netransitivaj verboj k.s. Sed kio min plej negative impresis, estas lia elekto de versmetriko sama tra la tuta poemaro, kio nepre monotoniĝas eĉ la sukcesintajn erojn. Lia dektrisilaba aleksandro nerimita, kiun konsistigas du komencaj trokeoj kaj tri sinsekvaj amfibrakoj igas la versoskandon ege teda, kaj tiun tedon li eĉ altrudas per fonetika ĵonglado, eĉ kiam lia esprimivo lin puŝus longigi la verson. Fakte li ofte diftongiĝas (sed li diras “konsonantiĝas”) la vokalojn *i* kaj *u*, (*kiu* = *kju* / *ĉielo* = *ĉjelo* / ktp), kio ŝajnas al mi nepardoninda atenco al la sonkarakterizoj de nia lingvo.

Neniadube ĉi volumo vekas intereson laŭ movadhistoria vidpunkto, laŭ la valoroj de la transnacia etiko liberecama, sed ĝi neniel rangas alte en la poeziaj valoroj. Verŝajne Dan Tirinaro submetis, en 1938, sian poemaron al neniu lingva kompetentulo por reviziado antaŭ publikigo kaj nun ni ne plu ekscios, kial la poeto ne poluris sian poezian lingvouzon, kiu, se pli altnivela, povintus kunluti majstroverkon pro la fortaj idealoj verse esprimitaj.

Nicolino Rossi

Rodrigo Fresan, *Esperanto*, Editore Einaudi, Collana "I coralli", Torino 2000, 200 p., prezzo di copertina L. 22.000.

Segnaliamo questo libro come curiosità, per gli esperantisti.

Federico Esperanto ha trentacinque anni ed è stato un cantante rock di successo in Argentina. All'inizio lo troviamo a bordo di una barca senza destinazione "L'angelo azzurro"; ne è proprietario Angelito de Dios García, amico e socio di Esperanto. Tra le vicende demenzial-esistenziali sapientemente intrecciate, Esperanto ritrova alla fine una donna amata e la figlia di lei, che aveva visto sequestrare dai militari nel 1978. Ma le due donne non sono più quelle che erano, e nel finale Esperanto compirà per loro un gesto estremo, nel tentativo di ristabilire la giustizia storica.

ĴUS APERIS

David Beetham kaj Kevin Boyle, *Kio estas demokratio? 80 demandoj kaj respondoj*. Ilus. Plantu. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA 2000, 143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: EUR 9,90.

Post "Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj" kaj "Paĉjo, kio estas rasismo?" UEA eldonis trian libron pri bazaj civitanaj scioj. La verko pri "Kio estas demokratio?" de la britaj profesoroj David Beetham kaj Kevin Boyle estas klara kaj facile komprenebla manlibro pri la esenco, celoj kaj praktika funkciado de demokratio, verkita laŭ komisio de Unesko.

Simile al la pli frua libro pri homaj rajtoj, la lernolibro pri demokratio estas verkita en formo de 80 demandoj kaj respondoj. Ili estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj; demokratia socio; la estonteco de demokratio.

Unuavice la libro celas kontentigi edukon bezonon en landoj, kiuj jus komencis enradikigi demokratiajn principojn kaj en kiuj ofte mankas propra tradicio pri ilia praktikado. Tamen, ankaŭ al loĝantoj en landoj kun longaj demokratiaj tradicioj ĝi estas utila legaĵo, ĉar ĝi prezentas interesajn vidpunktojn pri problemoj, kiuj estas temoj de aktuala debato en multaj landoj. La aŭtoroj montras, ke demokratio ne estas unuforma, sed ofte eĉ tre malsamaj solvoj kaj agadmanieroj povas esti aplikataj.

Krom doni praktikajn respondojn al konkretaj demandoj, per sia kritika aliro la aŭtoroj instigas demokratian pensmanieron, por ke la leganto sciu orientiĝi ankaŭ en situacioj, kiuj ne estas traktitaj en la libro.

Kiel kutime ĉe eldonaĵoj de UEA, "Kio estas demokratio?" havas tre belan grafikan veston, i.a. pro spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉefdesegnistino de la franca ĵurnalo *Le Monde*. (UEA)

ENLANDE

FRASCATI - Ĵaŭdon, la naŭan de marto, konkludiĝis la Esperanto-kurso por la lernantoj de la lastaj jaroj de la supera mez-lernejo (temas pri tiuj kursoj kiuj donas "kreditojn"). La kurso komenciĝis antaŭ kvar monatoj en la biblioteko de Fraskato (Frascati). Direktoro de la kurso estis Renato Corsetti kaj efektivaj instruantoj estis profesoroj Carlo Del Vescovo kaj Ugo Intini. La lecionoj celis ne nur doni elementan nivelon de kono pri nia internacia lingvo sed ankaŭ utilan komparon kun la angla lingvo. La Esperanto-grupo de Fraskato volis doni ĉi tiun apartaĵon al la kurso, ĉar ne estas eble forgesi la gravecon kaj utilecon de la angla en ĉi tiu momento. Oni nun esperas ke la lernejaj komisionoj agnoskos pli grandan gravecon al la atestiloj, en kiuj estas ankaŭ la ekzamen-noto akirita de la lernantoj.

Entute la rezulto de la kurso estis mult-promesa. Dudek kvar lernantoj ricevis la ateston kun tre bona noto. Vidu ĉi sube foton de la kursanoj; en la mezo la instruanto Carlo Del Vescovo.



ALESSANDRIA – Rosalba ed Angelo Giglio, soci del Circolo Esperantista "A. Bronchi" di Alessandria, sono diventati nuovamente genitori. Dopo Emilia, di tre anni, è nato Amedeo il 28 marzo 2000 a Torino. Congratulazioni ai *samideanoj* Rosalba e Angelo ed auguri al piccolo Amedeo, futuro esperantista con la sorellina. (*Emma Sottotetti*)

VENEZIA – "Pellegrinaggio in esperanto": con questo titolo il settimanale diocesano "Gente Veneta" sabato 6 maggio 2000 ha pubblicato un dettagliato articolo, con fotografia, nella pagina centrale "Speciale Giubileo" sul pellegrinaggio giubilare compiuto durante la Settimana Santa da due gruppi di giovani esperantisti, di diversi Paesi, a Venezia. Dopo un'accurata descrizione degli itinerari percorsi dai giovani pellegrini, l'articolo precisa che "Le preghiere e la Messa in esperanto sono state organizzate dal Gruppo Esperantisti Cattolici della diocesi di Venezia. Questo gruppo offre servizi di questo genere agli esperantisti stranieri come segno di accoglienza verso i pellegrini e come impegno di evangelizzazione verso i turisti. Si possono prendere contatti con il gruppo Esperantisti Cattolici telefonando allo 041 5341532 mentre l'indirizzo elettronico è:

esperantovenezia@libero.it ”.

L'articolo risalta perché occupa mezza pagina e il titolo è grande. Inoltre, il settimanale è stato venduto al Palasport durante la Festa di 2.500 giovani.

(Paola Ambrosetto)

TRAMONDE

HUNGARIO – Internacia renkontiĝo de esperantlingvaj familioj. Ĝi okazos en *Vác* de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto. Loĝado: en 3 kaj 4 litaj ĉambroj, en studenthejmo. Kosto, por okcidenteŭropaj landanoj: infanoj ĝis la 12-a jaro, 75 Eŭroj; plenkreskuloj, 95 Eŭroj. Programoj: krom la kutimaj programoj (urborigardo, ludo, desegnado, kantoj), estos ŝipveturado sur Danubo, ekskurso al la monto Esperanto, vizitado en grot-baseno kaj multaj libervolaj programoj. Petu aliĝilon al: István, Organizado de REF 2000 *bagó@kern.hu* (de *Renato Corsetti*)

GERMANIO - SPD prezentiĝas Esperante - En la reganta germana partio SPD ekzistas t.n. Virtuala Loka Societo (Virtueller Orstverein), en kiu intertempe aniĝis pli ol 1000 membroj, kiuj diskutas politikajn temojn rete. Tiu societo prezentas sin en la germana, angla, franca hispana kaj Esperanto. La esperantigon faris Matthias Peick kaj Tomas Schild. La adreso estas <http://vov.de>. (*Interredaktore*)

ANJOU (Francio) – Informoj pri turismo kaj ekonomio en la franca provinco *Anjou*, departemento *Maine-et-Loire*, en kiu situas la esperanta kulturdomo de la kastelo *Gresillon (49150 Baugé)*, estas haveblaj pere de Internet. Serĉu ĉe: <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/anjou/index>. (*A. Frankeul*)

MEKSIKURBO (Meksiko) - La 5a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto okazos en Meksikurbo, Meksiko, ekde la 15a ĝis la 21a de aprilo 2001. Ĝia ĉeftemo estas: AMERIKO: UNU KONTINENTO, DIVERSAJ HISTORIOJ

Por informoj kaj aliĝoj skribu al: *Federación Mexicana de Esperanto, Apartado Postal 10576, MX-06000, Mexico, D.F. MEKSIKO*, aŭ per fakso al *Michael Porter 52-5-5624333* aŭ al la retadreso: mike@math.cinvestav.mx

Aktualaj informoj troveblas ankaŭ en la TTT-paĝon <http://punto-y-aparte.com/esperanto>

ZAGREBO (Kroatio) - Sub la aŭspicioj kaj kun la subteno de la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj la Akademio de Esperanto organizos internacian simpozion pri lingva planado kaj leksikologio, okazonta en Zagrebo, Kroatio, de la 28a ĝis la 30a de julio 2001. La laborlingvoj estos la kroata, esperanto, la angla kaj la franca. La malferma ceremonio de la simpozio okazos en la posttagmezo de la 28a de julio (sabate), kaj la simpozio finiĝos en la posttagmezo de la 30a de julio 2001 (lunde).

Simpozio: La Iliria Halo de la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj, Opatička 18, HR-10 000 Zagrebo, Kroatio.

HISPANIO – La 59a Hispana Esperanto-Kongreso okazis de la 29a de aprilo ĝis la 1a de majo en la urbeto San Sebastián de los Reyes, norde de Madrido.

La kongreso estis surprize sukcesa. Ĝi altiris la neatenditan atenton de multaj amasinformiloj: ĝi aperis en regionaj, lokaj kaj naciaj ĵurnaloj. Estis raportetoj en regiona kaj loka televido, en privata nacia radi-elsendejo kaj en la regiona programo de la publika nacia radi-elsendejo. Kaj, ho surprize, nemalgranda raporto (2-3-minuta) en la nacia elsendo de privata nacia televido, dum pinta elsendohoro! La ĵurnalistoj de la televido pasigis tutan matenon filmante ĉion: prelegojn, atelierojn, intervjuojn, konversaciojn, laŭtparolojn ktp, ktp.

La partopreno estis malmultnombra, kun malmultege da eksterlandanoj kiuj certe vigligitus la aferon rilate al amaskomunikiloj, se ili estintus pli multnombraj, sed aliflanke la proporcio de junuloj estis nenormale granda; la nivelo de esperanto estis altkvalita; la urbestro parolis belege pri esperanto (kaj bonintence EN esperanto) dum la inaŭguro kaj li postrestis por la unua prelego kaj eĉ ĉeestis entuziasme enkondukante kurson!

Ni invitis du eksterulojn por paroli pri siaj fakoj (unu lingvistikino, la alia estraranino de Amnestio Internacia de Hispanio); ni organizis samtempan tradukadon (interpretadon) por tiuj hispanlingvaj prelegoj, kaj ankaŭ por kelkaj interesaj prelegoj en esperanto al la hispana, por ke ekstermovadaj vizitantoj komprenu; la tradukadon faris Jorge Camacho, akademiano kaj profesia interpretisto.

Fakte okazis ankaŭ paralela junulkongreso kun partopreno de komencantoj kaj komencontoj krokodilaj, kiuj (re)entuziasmiĝis pri esperanto.

(*Manuel Pancorbo*)

IJK - Internacia Junulara Kongreso Grava atentigo.

TEJO atentigas, ke la aliĝkondiĉoj por la IJK 2000 en Honkongo ŝanĝiĝis. La ŝanĝoj koncernas nur aliĝantojn super 30. Tiuj aliĝantoj devas pagi la tutan kotizon kiam ili aliĝas! Ĉiuj aliaj kondiĉoj, ankaŭ tiu pri malaliĝo, restas samaj. (*ret-info*)

(*Holger Boos, TEJO-estrarano pri kongresoj, Holger.Boos@gmx.de*)

NI FUNEBRAS

La 24an de aprilo forpasis samideanino **s-ino Renata Deleonardi Bonvicini** kiu estis tre aktiva en la E-Grupo de Trento jam ekde la 50aj jaroj. Al la familianoj kaj al samgrupanoj iru niaj elkoraj kondolencoj.

Triesto 2000

Triesta Esperanto-Asocio partoprenis en la farbado de Placo de la Unuiĝo de Italio

La fama Triesta placo ricevis printempan, portempan veston! Antaŭ ties renovigo, la triesta Komunuma Estraro volis, ke ni kune ĝin adiaŭu per konkreta kontribuo: ĉiuj triestanoj estis alvokitaj farbi la placon laŭ la desegnaĵo farita de la pentristo Bruno Chersicla. Jen kiel la triesta artisto priskribis kaj klarigis sian verkon (9an de marto 2000).

La pentraĵo, kovranta la placon, simbole inspiriĝas el historia pasinteco de Triesto kaj ties ekonomia aspirio kiel pordo direkte al Oriento. La desegnaĵo reprezentas Eŭropon kaj Trieston: ĝi estas enkadrigita en pordo kun orient-forma arko, en kiu Orienton signas ankaŭ la Leviĝanta Suno kaj la Lunarko, dum la flavaj steloj en lazura fono aludas pri la flago de Eŭropa Unio.

La simbola prezento, estigita de l' memoro pri la antikva mitologio, montras virinon, armitan per halebarda lanco (Triesto) kaj rajdantan taŭron, kiu ŝin kondukas al la maro. Tio ĉi celas indiki la volon de la urbo sin proponi kiel protagonisto sur la scenejo de Eŭropa Unio. La dimensioj de la verko, etendiĝanta eĉ preter la altaĵo de la centra surfaco, egalas al 72 metroj oble 144, nome entute 10 368 kvadrataj metroj. Por ĝin realigi oni utiligos laveblajn akvo-farbojn, kiujn oni ŝmiros en definitaj zonoj nigrakolore konturitaj: ĉiuj, kiuj emos improvize roli kiel pentristoj, povos en ĉi laboro partopreni, postlasante tiel sian subskribon sur la verko.

Pro la giganta formato de la pentraĵo kaj pro la kunlaborado de tiom da volontuloj, oni povas ĝin konsideri aŭtentika krea agado, plenumita ene de tre difinita tempo kaj de limigita spaco, destinata ekzisti nur en la tempodaŭro necesa por ties efektivigo: ĝi malaperos, lasante en la roluloj la memoron kaj en la ceteraj fotografan "dokumenton" pri la verkaĵo. Nia-kaze, dum la farbado ĉiu el ni pentros mozaikecon, sen havi ideon pri la tĉu, eventuale ĉerpante el memoro la kompletan vidaĵon de la grafikajo: sed dum la labor-momento oni sin dediĉos nur al "propra" placo. Nur je la fino ĉiu parto eniĝos en la finan komponaĵon kaj la rezulton eblos kontroli nur de supre, de la alto. Provoke oni uzis la terminon "grafitio", ĉar, antaŭvide de la estonta renovigo de tiu historia placo, oni ja preskaŭ rajtas ĝin nunmomente transformi, ĝuste pro la portempeco de tiu ellaborajo, alimaniere neniel realigebla. La pentraĵo videblas ĝis la duono de majo, poste oni komencos la laborojn de repavimado, kiuj daŭros pli-malpli unu tutan jaron. Kiu estas interesita vidi la bildon, tiu povas viziti la ejon: www.comune.trieste.it

Sed ankaŭ Triesta Esperanto-Asocio partoprenis en la farbado: 15 inter la asocioj helpis farban-te grandan pecon per flava koloro. Bedaŭrinde la verda koloro ne estis planita...

Edvige Tantin

Massa

Omaggio ai Fratelli Dazzini

Il 5 dicembre 1999 si è svolta a Massa una giornata di omaggio ai Fratelli Dazzini, organizzata con il patrocinio dell'Amministrazione Comunale, dell'Amministrazione Provinciale, dell'Azienda di Promozione Turistica e dell'Archivio di Stato.

La sera del 4 sono arrivati i rappresentanti dei gruppi delle varie città, tra cui il presidente Formizzi, e abbiamo passato una bella serata conviviale a base di cucina ungherese. Il giorno 5 il programma è iniziato con la S. Messa in Esperanto cantata dal gruppo dei giovani della Corale "Maria Ausiliatrice" dei Quercioli e accompagnata da un antico organo del '700.

Successivamente le Autorità cittadine hanno dato il benvenuto e ricevuto gli esperantisti presso le "Stanze" del Teatro Guglielmi. Dopo il caloroso saluto dell'Assessore alla Pubblica Istruzione, dr. Sirio Bonini, che ha seguito con grande interesse tutti i lavori, ha preso la parola il presidente prof. Giordano Formizzi che ha parlato dell'Esperanto nella prospettiva europea.

Poi il giudice Stoppoloni, vecchio caro amico dei fratelli Dazzini, ha ricordato con emozione i particolari della Loro vita esperantista. La prof. Gabriella Lottini, titolare della Cattedra massese della ILEI, ha illustrato con diapositive e brani di conferenze vari momenti significativi. Hanno poi preso la parola, tra gli altri, il dr. Broccatelli e la dr.ssa Olga Raffo, direttrice dell'Archivio di Stato.

Nel pomeriggio c'è stata una visita al Castello Malaspina, guidata dall'architetto Nicola Gallo, giovane eminente studioso dei Castelli locali, sulla storia dei quali ha già pubblicato vari libri. Una visita veramente interessante che ha colto di sorpresa gli stessi esperantisti massesi che credevano di conoscere bene la storia del Castello. La serata si è conclusa in allegria con il presidente Formizzi, la sig.ra Neri e il gruppo locale.

La città è rimasta colpita dalla partecipazione veramente sentita di esperantisti e non, ed i giornali locali ne hanno parlato con vari articoli.

Alessandro Simonini

Esprimiamo le più vive condoglianze al *samideano* prof. Enrico Mingo, a tutti noto, per la perdita dell'amato fratello **Archimede**, poeta e scrittore, vincitore di parecchi premi letterari, grande invalido di guerra e vicino all'esperanto, che pure apprese.
(L'esecutivo FEI e la redazione de *l'esperanto*).

12a ALP-ADRIA ESPERANTO KONFERENCO

Ptuj, Slovenio, 22-24/9/2000

Temo: TURISMO KAJ ESPERANTO


Ĉi jare la Alp-adriaj Esperantistoj konferencos en Slovenio, en ĉarmega urbeto, kultura trezorejo pro sia vigla miljara historio, kies nomo - eble - por italoj ne estas tro facile prononcebla: Ptuj. Nomo tamen, laŭ mia opinio, iom mistera, kiu vekas en la kapo bildojn pri mezepokaj tempoj. Plejverŝajne la realo estas tute alia: Ptuj estas ĉirkaŭita de montetoj kun vinberoj, kasteletoj, preĝejoj; famaj estas ĝiaj vinkeloj kaj gustumado de tiaj trinkaĵoj imponas sin. Ptuj estas ankaŭ sidejo de renomaj termofontaj akvoj, tiel ke restado en esperantista etoso kunmetita al vizitado de basenoj, saŭno kaj termaj strukturoj (senpagaj por la gastoj de la Termobanejo), fariĝas aparte ĝuinda kaj alloga.

La konferenca temo estas intence "malpeza" kaj permesos al ĉiuj abunde profiti de la mirindaĵoj de tiu parto de Slovenio, ofte ne tro konata eksterlande. Loĝado estas antaŭvidita ĉe la Termobanejo, ĉu en apartamentoj ĉu en bangalo, tre komforte kaj je favora prezo, sed oni eĉ povus utiligi la studentan hejmon por malpli kosta tranoktado.

Ekskursoj jam planitaj kondukos vin al la plej fama loka vinkelo, al tre grava kaj interesa muzeo, al kastelo kaj antikvaj restaĵoj.

Geamikoj el Aŭstrio, Slovenio, Kroatio kaj Hungario partoprenos la aranĝon kaj dum kelkaj tagoj vi sukcesos forgesi la italan lingvon favore al konstanta utiligo de la internacia lingvo, kiu ne estas la angla sed esperanto!

Ne perdu la okazon, petu informojn kaj aliĝilon kiel eble plej rapide al "Triesta Esperanto-Asocio" c.p.601 - 34100 Trieste, esperanto@retectivica.trieste.it aŭ nored@tiscali



INFORMOJ DE AIS IJF denove invitas AIS

Dum la 24a Internacia Junulara Festivalo de Itala Esperanto-Junularo (en Cavallino apud Venecio, Italio, 2000-04-19/25) denove okazis studadsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino. Jam lastan jaron IEJ invitis AIS fari universitatajn kursojn dum IJF, kaj pro la granda sukceso la organizantoj de IJF ripetis tion. Kadre de la festivala temo "Ĉu esti aŭ ne esti Eŭropano" AIS proponis al la festivalanaro jenajn kursojn:

- 1) Naciismoj en Eŭropo (Carlo Minnaja)
- 2) Ĉu ni jam konas nian lingvon antaŭ la nasko aŭ ĉu ni lernas ĝin? (Renato Corsetti)
- 3) Eŭropaj aspektoj de komputil-programado (Reinhard Fössmeier)

La kursoj (kun po ok lecionoj) trovis viglan intereson, kaj kelkaj "festival-studentoj" eĉ akiris atestilojn por uzo en plua studado ĉe AIS aŭ ĉe aliaj institutoj. Cele uzon ekster AIS la atestoj estas ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la loka (itala) lingvo, kaj mencias la precipajn kurs-temojn.

TEJO, kiu estis kunorganizanto, eldonos pri la IJF-kontribuoj tekstaron. Centran lokon okupos prelegserio kun la temo "Junaj Eŭropanoj por egaleca lingvopolitiko — ĉu ni estas pretaj por taŭgaj proponoj?", kiun laŭ invito de TEJO prezentis la konata interlingvisto Detlev Blanke. Ankaŭ pri la AIS-kursoj aperos resumoj en la tekstaro

Unua AIS-kongreso en Meksikio

De jaŭdo, 2000-04-13, ĝis la paska dimanĉo, 2000-04-23, okazis en la universitato de Celaya [selaja] (ŝtato Guanajuato [ĝuanahŭato] de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Meksikio) la inaŭgura kongreso de AIS Meksikio, registrita hispanlingve kiel *Academia Internacional de las Ciencias [RSM] - Filial México*.

Ĝin organizis la du estroj de AIS-Meksikio, la psikologo AProf. Rubén Feldman González dr. el Mexicali [meĥikali] kaj la neŭrofiziologo Gustavo Vega Gama dr. el Celaya mem.

La fondodokumenton subskribis 31 sciencistoj. Krom ĉ. 70 Meksikiaj kongresanoj partoprenis el Eŭropo OProf. Dr. habil. Helmar Frank, prezidanto de AIS, kaj Bac. Ana-Maria Pinter. El Hindio venis profesoro Padmanabhan Krishna, rektoro de la edukcentro Rajghat, kaj el Usono profesoro Karl Pribram de la universitato Georgetown [ĝoĝtaŭn] el Vaŝingtono. Ambaŭ kontribuis al la prelegprogramo, kiu ampleksis ĉ. 30 preleghorojn plus ampleksajn kaj viglajn diskutojn. (Reinhard Fössmeier) (El "Eventoj")

Noto: En la supra teksto ni lasis senŝanĝaj la geografiajn terminojn uzatajn de la aŭtoro, sed ni opinias ke la vorto Meksiko devas indiki la landon (hispane Méjico, itale Messico, angle Mexico) kaj ke ĝia ĉefurbo (hispane Ciudad de Méjico, itale Città del Messico, angle Mexico City) estu en esperanto Meksikurbo. (Red.)

COMUNICAZIONE E MEDIAZIONE COMUNICATIVA

Tra i grandi fenomeni che contrassegnano la seconda metà e in specie gli ultimi decenni del secolo XX vi è il grandioso sviluppo della comunicazione. Esso è legato a vari fattori - di natura politica, economica, scientifica, tecnologica - che si tengono assieme concorrendo a definire i caratteri di un'epoca nuova.

Quale sia, oggi, la reale situazione del mondo sfugge al comune osservatore. Tuttavia, qualunque operazione intesa a decifrarne il senso è sempre un atto conoscitivo e dunque anche un fatto comunicativo. Quello della comunicazione è il terreno in cui continuamente dobbiamo misurarci; nella grande maggioranza dei casi, purtroppo, come soggetti passivi, semplici recettori. A tale condizione è forse impossibile sottrarsi del tutto. Le ragioni sono evidenti. Fra le tante, ce n'è una che ha un peso particolare, in un sistema di comunicazione che tende ad essere globale. Ci riferiamo alla lingua.

La comunicazione è tante cose: passaggio di conoscenze, di saperi, modi di pensare, sensibilità, credenze, fedi, sentimenti, valori... Tutto questo movimento si compie attraverso lo strumento della lingua. Le lingue, lo sappiamo, sono organismi vivi, delicati, mobilissimi, aderenti ad ogni piega della società. Esse però, per quanto resistenti, possono anche deperire ed estinguersi. Il loro declino e la loro fine sono probabilmente legati al destino delle società in quanto realtà dotate di identità propria. I due fenomeni, possiamo pensare, sono intrecciati fra loro, essendo l'uno ad un tempo causa ed effetto dell'altro.

Se consideriamo la comunicazione con riguardo non a ciò che è oggetto di scambio, ma allo strumento dello scambio, ossia alla lingua, vediamo che essa, la comunicazione, non è solo movimento di qualcosa, ma anche passaggio da una lingua ad un'altra. E ciò avviene oggi con assai maggior frequenza che in passato. Se poniamo attenzione a questo aspetto della comunicazione, rileviamo che il caso più comune è quello del passaggio dall'inglese ad altre lingue.

A cosa sia dovuta tale situazione è molto chiaro. La spiegazione sta nel fatto che gli Stati Uniti sono il punto di riferimento per quasi tutto ciò che avviene nel mondo. E questo a partire dalla conclusione del secondo conflitto mondiale. Al punto che ormai possiamo parlare di quella nazione come dell'unica superpotenza planetaria e di un mondo divenuto unipolare, dopo il crollo dell'Unione Sovietica.

Noi, in Europa come nel resto del mondo, non possiamo che registrare la vittoria riportata dall'America, in particolare nella sfida globale contro il blocco comunista. È stata, bisogna dire, al di là di ogni altra specificazione di tipo ideologico, la vittoria del sistema capitalistico. E questo significa anche l'affermazione di un sistema che dall'economia si irradia in ogni direzione e si estende dal centro alla periferia.

Vediamo inoltre una sempre più scoperta tendenza a considerare obsoleto tutto ciò che resiste a quello che si ritiene essere, oggi, il moto della storia. Che poi sarebbe, in sostanza, l'applicazione su scala mondiale del modello americano. Questa è la realtà. La domanda è se e fino a che punto sia giusto che il resto del mondo si conformi a quel modello.

Tornando alla comunicazione e al ruolo e al destino delle lingue, prendiamo atto che alla dimensione di protagonista mondiale degli Stati Uniti, nell'attuale fase storica, si accompagna di conseguenza un peso proporzionato anche nella comunicazione. È nell'ordine delle cose che il maggior flusso di informazioni vada nella direzione centro-periferia. Come pure è "normale" che la lingua con cui veicolarle sia, al presente, l'inglese. È in inglese che viene prodotta la maggior mole di materiale comunicativo funzionale al sistema globale. Il fatto che esso sia anche diffuso in quella medesima lingua appare dunque del tutto giustificato.

Nella situazione appena descritta sembrerebbe operare una logica inoppugnabile. Ma forse è solo apparente.

Se riflettiamo a ciò che avviene nel passaggio di un contenuto comunicativo C da una fonte F a un ricevente R - nel caso in cui F ed R non facciano uso della medesima lingua -, constatiamo che assai difficilmente riesce a passare tutto: qualcosa sempre si perde per via, nella traduzione. A meno che C non sia rigorosamente codificato, come accade in alcune materie settoriali e specialistiche. Ma è chiaro che la comunicazione non può essere solo questo.

La difficoltà potrebbe essere aggirata inserendo tra F ed R un terzo elemento M , noto ad entrambi, per il quale far passare C . M sarebbe una terza lingua, avente la specifica funzione di "mediare", cioè far da ponte, da *bypass* tra i due termini della relazione comunicativa.

Qualcuno potrebbe osservare che il risultato sarebbe, in tal caso, una doppia perdita, nei due

passaggi da F a M e da M ad R . Ma l'obiezione non sembra reggere, se si tien conto del fatto che la lingua mediatrice M sarebbe nota tanto ad F quanto ad R in misura tale da garantire una comunicazione praticamente senza residui apprezzabili. In più, la presenza di M , ponendo i termini della relazione su un piano di parità, renderebbe per ciò stesso i loro ruoli intercambiabili.

La procedura illustrata è quella in cui, nel rapporto comunicativo, al passaggio diretto da una lingua ad un'altra si sostituisce quello indiretto, ovvero un rapporto che si giova di una terza lingua in funzione di "elemento medio" o "ponte" tra i due termini del rapporto medesimo.

Dei vantaggi connessi alla mediazione comunicativa è stato detto. Va ancora sottolineato che, mentre nella relazione F - R (dove F stia per inglese), il movimento è sostanzialmente nella sola direzione da F verso R , in una relazione F - M - R esso sarebbe nelle due direzioni, da F ad R e da R ad F .

Quali dovrebbero essere i requisiti di una lingua di mediazione discende dalla natura stessa del suo ufficio, che sarebbe quello di assicurare che nel trasferimento da una lingua ad un'altra si perda il meno possibile di ciò che è oggetto della comunicazione. La prerogativa sua principale dovrebbe essere il massimo di chiarezza e di non ambiguità.

La necessità di soddisfare tale esigenza esclude che quel compito possa essere svolto da una lingua priva di regole certe relativamente a tutti gli aspetti del suo funzionamento: dalla fonetica alla grammatica, come pure alla stessa formazione del lessico.

Tale requisito sarebbe fondamentale e in un certo senso anche unico, gli altri derivando di conseguenza da quello. Giacché una lingua di questo tipo non potrebbe non caratterizzarsi anche per una maggiore semplicità e facilità di apprendimento rispetto a tutte le altre.

È chiaro che qui si sta parlando di una lingua non esistente "in natura", e che nemmeno potrebbe esserlo, in ragione della sua particolare specificità. Non impossibile, tuttavia. Anzi, oseremmo dire che è imposta proprio dall'attuale stadio di sviluppo dell'umanità. Non è infatti pensabile, a ben riflettere, che tutto il resto del mondo sia obbligato a pagare una sorta di "pedaggio", in quello che è oggi il campo in maggior espansione, la comunicazione, a una sola parte: un Paese, o anche un *club* di Paesi.

Se nell'attuale congiuntura storica è incontestabile il primato di quella parte, nella produzio-

ne di "comunicazione utile" (s'intende *funzionale al sistema globale*), soprattutto perché legato anche a un primato materiale e strutturale, dovrebbe però almeno esserci la garanzia di un'efficace *mediazione linguistica*, che assicuri a tutti - schematizzando, a produttori e consumatori - le condizioni per il massimo possibile di *trasparenza interpretativa*.

Da quanto fin qui detto dovrebbe risultar chiaro che, se non c'è mediazione, non ci può essere, sul terreno della comunicazione, che un rapporto sbilanciato e - perché no - iniquo: di egemonia (discutibile) di una parte, quella dei privilegiati, signori anche della parola, su tutti gli altri.

Tornando sul concetto di *lingua di mediazione*, ci preme precisare che, dicendo che quella lingua non esiste in natura, non si è inteso affermare implicitamente che le lingue che noi tutti parliamo siano "naturali". Esse, sappiamo bene, sono prodotti storici, culturali, con tutto quel che di arbitrario e casuale ciò può significare.

Quella lingua, però, non sarebbe neppure questo: sarebbe qualcosa di meno; ma anche, forse, qualcosa di più. Non avrebbe la "naturalità" e la dignità delle cose profondamente radicate nella tradizione; ma avrebbe l'efficienza, la funzionalità delle invenzioni dell'ingegno umano: come il treno, l'aeroplano, il computer... La sua adeguatezza allo scopo sarebbe provata dalla capacità di rendere possibile, per suo tramite, la conversione col massimo di approssimazione da una lingua a un'altra.

Conviene, prima di chiudere, prevenire una probabile obiezione. E cioè che una lingua... così efficiente potrebbe finire col soppiantare tutte le altre. L'obiezione è seria. A tale preoccupazione, forse plausibile, se ne può però contrapporre un'altra: che ne sarà delle lingue se una di esse, più forte delle altre, prenderà il sopravvento su tutte? Accetteremmo una simile prospettiva come imposta da una "legge di natura"? Proprio quando tali leggi vengono sempre più spesso trasgredite e rese inoperanti - anche in campi in cui sembravano sacre e intangibili - per il crescente potere della scienza e della tecnologia.

Tutt'al contrario, dovremmo dire che quello della comunicazione e della lingua sarebbe uno dei pochi campi residui di applicazione di una legge "di natura", nel senso di una rigorosa e deterministica "selezione naturale". E questo con molte ricadute, in molti casi sicuramente negative.

Contardo Telaretti

Firenze, marzo 2000

I VOCABOLARI

Nino Vessella, Renato Corsetti, *Vocabolario Esperanto-Italiano Italiano-Esperanto*

Co.Ed.Es. 1998 - 21 cm., 108 p., 15.000 lire.

NUOVO VOCABOLARIO DI BASE, fondato sul vocabolario fondamentale di primo livello della lingua italiana e sui morfemi di base dell'esperanto.

Contiene circa 3600 parole italiane e circa 2100 morfemi esperanto.

Carlo Minnaja, *Vocabolario Italiano-Esperanto*

Co.Ed.Es. 1996, rilegato in imitlin.,

21 cm., 1438 p., A5, 110.000 lire

Circa 58.000 vocaboli, compresi nomi propri e termini stranieri; corredato da molti esempi e locuzioni e da frasi tratte dalla letteratura.

Umberto Broccatelli, *Vocabolario Esperanto-Italiano*

Co.Ed.Es. 1991 - 2ª Ediz. 21 cm., 498 p., 40.000 lire.

Il più completo vocabolario esperanto-italiano, completo di derivazioni, parole composte e molti esempi di uso.

LE GRAMMATICHE

Bruno Migliorini, *Manuale di Esperanto* - Prefazione di Tullio De Mauro

Co.Ed.Es. 1996, 21 cm, 160 p., 18.000 lire

Nuova edizione del manuale di esperanto più usato in Italia, opera del maggior linguista italiano di questo secolo, arricchita di esercizi strutturali.

Umberto Broccatelli, *Nuovo corso di esperanto, per allievi e autodidatti.*

Manuale di esperanto completo, corredato di esercizi e della relativa chiave, di un vocabolarietto e di letture tratte dalla letteratura esperanto.

Co.Ed.Es. 1995, 2ª ediz., 22 cm, 192 p., 24.000 lire

Nino Vessella - Renato Corsetti, *Manuale di Esperanto - secondo livello*

Continuazione ideale dei testi che vengono generalmente usati nei primi corsi di esperanto.

Co.Ed.Es, 1999, pag. 320, prezzo L. 24.000

L'ANTOLOGIA ITALIANA

Itala antologio, red. Giordano Azzi

Antologia completa della letteratura italiana tradotta in esperanto

(prosa e poesia)

dalle sue origini all'inizio del novecento.

Co.Ed.Es. 1987

illustrata, 21 cm., 477 p., 45.000 lire



*Sconto del 33% per acquisti di almeno 3 copie dello stesso titolo.
Ai prezzi vanno aggiunte le spese postali. Spedizione contr'assegno.*

COoperativa EDitoriale ESperanto - Via Villorosi 38, 20143 Milano

Tel./fax 02-58100857 - c.c.p. n° 13647201